

la terpomo

Nederlandanoj manĝas multe da terpomoj. Ofte en "mikspoto": terpomoj miksitaj kun legomoj kiel krispa brasiko aŭ saŭrkraŭto. Ankaŭ frititaj, la terpomoj bone manĝiĝas. Terpomfritoj kun majonezo estas kiom eble plej nederlanda.

La terpomo bone kreskas en la nederlanda tero, sed devenas fakte el Sud-Ameriko. En la dek-sesa jarcento Hispanoj kunportis ĝin al Eŭropo. Unue oni ĝin uzis kiel nutraĵon por bestoj kaj por homoj en malliberejoj. Nur en la dek-naŭa jarcento la terpomo fariĝis grava parto de la manĝo en Okcident-Europo. La nederlandaj mikspotoj en tiu tempo ekestis.

la muelilo

La ventomuelilo apartenas al la nederlanda pejzaĝo. Tio estas pro tio ke la mueliloj helpi en la kreado de la pejzaĝo. En la deksesa jarcento mueliloj pumpis la akvon el la lagoj, kiuj fariĝis "polderoj". Tiel la tero, kiu troviĝa kelkfoje ses metrojn sub marnivelo, sekiĝis. Mueliloj ne estas nederlanda invento. La unuaj mueliloj ekestis en Ĉinio kaj Persio. Tie oni uzis ilin por mueli farunon el greno. En Nederlando oni adaptis la muelilon por pumpi akvon aŭ segi lignon. Ĉirkaŭ la jaro 1600 lignosegado estis granda industrio. En Zan-regiono centoj da mueliloj funkciis por segi lignon por la ŝipkonstruado.